

# IBERIA

## ESPERANTISTA

### REVUO

NUMERO 2

MARTO-APRILLO 1931

La 14. aprilo 1931 estis proklamata la Respubliko federacia hispana. En Madrido ekstariĝis provizora registaro, sub la prezido de S-ro Niceto Alcalá Zamora.

En Barcelono estis proklamata la kataluna respubliko, libera ŝtato federaciigonta kun la hispana. Ekstariĝis provizora registaro, sub la prezido de S-ro Francesc Macià.

Post kelkaj tagoj, por solidigi la respublikon en la tuta Hispanujo kaj ĝis la estonta hispana parlamento fikso la novan Konstitucion, oni amike interkonsentis ke la kataluna registaro ne uzos la nomon "kataluna respubliko", sed tiun: Govern de la Generalitat de Catalunya (kiu estis nuligita en la jaro 1714), kaj provizore havos "self-government".

Nun regas plena ordo kaj harmonio, kaj la publika vivo normale disvolviĝas.

IBERIA ESPERANTISTA REVUO salutas la novan Respublikon kaj ĝojas pri la triumfo de la Demokratio, esperante ke iam Iberio estos unu granda unuaĵo, kun plena libereco de ĝiaj partoj. Ni petas la tutmondan esperantistaron, disvastigi ke la Hispana Respubliko pace stariĝis kaj grandanime pardonis la kulpojn de unu el la plej fiaj monarkioj iam ekzistintaj.

PROTEKTANTOJ de "IBERIA ESPERANTISTA REVUO"

S-RO NARCÍS BOFILL, L. K., el Palma de Mallorca. Inĝeniero.

S-RO MANUEL MAYNAR, el Zaragoza. Advokato. Provinca Deputito.

S-RO DELFÍ DALMAU, el Barcelona. Profesoro. Direktoro de "Liceu Dalmau".

S-RO VICTOR O. DE ALLENDE, el Bilbao. Vojinĝeniero.

S-RO ANDRÉS PIÑÓ, el Valencia. Advokato.

"Protektantoj" estas tiuj samideanoj, kiuj unufoje faras al "IBERIA ESPERANTISTA REVUO" donacon de 100 ptoj.

# IBERIA ESPERANTISTA REVUO

DIPUTACIÓ, 50 - BARCELONA

APERAS DUMONATE  
JARABONO:  
POR IBERIO: 6 PESETOJ  
POR ALIAJ LANDOJ: 1 DOLARO

DIREKTORO:  
**JAUME GRAU CASAS, L. K.**

## KURAGE ANTAŬEN!

Kiam ni decidis fondi IBERIAN ESPERANTISTAN REVUON, ni konsciis la renkontotajn malfacilaĵojn, eĉ havis klaran ideon pri la nombro da eblaj abonantoj. Ni bone scias, ke multaj eĉ fervoraj samideanoj trovas karaj la esperantaj gazetojn kaj librojn, ne atentante al tio, ke la nombro da subtenantoj estas malgranda kaj la kosto de komposto, papero kaj preso estas tre granda. Aliflanke multaj hezitas aboni gazeton, eble malaperontan post tri aŭ kvar numeroj. Sed ni estus tro pesimismaj se ni ne kredus, ke ankaŭ multaj samideanoj *en niaj latitudoj* ne abonas nur pro la laboro skribi kaj fari monsendon. Ni opiniis, kaj opinias, ke fine troviĝos sufiĉa nombro da abonantoj, *sufiĉa...* almenaŭ por ke la deficino estu elportebla. Tial, por kompensi la mankon de *sufiĉaj* abonantoj, ni vokas la plej fervorajn aŭ la plej riĉajn, ke ili fariĝu "Protektantoj" de nia revuo aŭ donu al ĝi specialan subtenon.

Ĝis nun ni ricevis malmultajn abonojn. Sed ni sendas nian revuon al tricent gesamideanoj, kiuj ne abonis ĝin, kaj ni forte esperas, ke la plej multaj el ili fine fariĝos pagantaj abonantoj. Tio certe helpas daŭre viviĝi nian gazeton.

Laŭ sugestoj al ni faritaj, ni decidis malpliigi la nombron da paĝoj kaj proporcie ankaŭ la abonprezon. De nun

niaj numeroj estos 32-paĝaj kaj nia jarabono kostos 6 pesetojn. Ni esperas ke tiu ĉi malgranda sumo—duonpeseto ĉiumonate—ebligos al ĉiu fervora esperantisto la abonon al I. E. R. La malmultaj samideanoj jam pagintaj naŭ pesetojn, iel ricevos kompenson, se ili ne volas doni kiel subtenon por nia revuo la krompagitajn tri pesetojn.

\* \* \*

Jam antaŭ unu jaro ni dissendis maŝinskribitajn cirkulerojn pri la fondó de IBERIA ESPERANTISTA REVUO. Antaŭ kelkaj monatoj ni dissendis presitajn cirkulerojn al pli ol 700 adresoj en Iberio, kaj leteron al pli ol 70 grupoj. Sur la kovriloj de "Kataluna Esperantisto" ni aperigis anoncon.

Kiam aperis nia unua numero, ni dissendis ĝin, kiel estas dirite, al tricent ne abonintaj gesamideanoj, same kiel al la abonintoj, al la tutmonda esperanta gazetaro, al la Iberiaj Esperanto-grupoj kaj al multaj ne-esperantaj ĵurnaloj, gazetoj kaj bibliotekoj en Iberio.

Sed ni ne estas tro pretendemaj kaj scios atendi la ĝermojn de tiu semado.

\* \* \*

En alia loko ni publikigas kelkajn kuraĝigajn leterojn al ni adresitajn. Nur unu ni ricevis, kiu malaprobas nian entreprenon. Ĉu I. E. R. vivos longe aŭ mallonge, la tempo tion diros. Sed kiam oni perdis la entuziasmon, kiam oni opiniis malsukcesontaj tri-kvar entreprenojn, kiuj poste montriĝis sukcesintaj, oni ne rajtas agi kiel profeto kaj antaŭdiri malsukceson. Tia *derrotismo* estas pli danĝera ol la troa optimismo, naiveco kaj iluziemo, kiuj povas ekzisti en nia certe tre kuraĝa entrepreno havigi esperantan organon al la plej moderna kaj plikreskiĝanta Iberia kulturo.

Larĝvidaj spiritoj iom post iom povos observi nian taskon kaj la nuancojn de nia tasko.

## LA CUESTIÓN DE LAS LENGUAS EN EL PRIMER CONGRESO INTERNACIONAL DE MICROBIOLOGÍA.

Por el Doctor NEVEUX, de Giffaumont (Marne).

En la sesión plenaria, Bordet, el presidente, leyó los estatutos de la Sociedad internacional de Microbiología, según los cuales las comunicaciones solo eran autorizadas en tres lenguas: alemán, inglés y francés.

Un congresista propuso que se añadiera el italiano.

Bordet se negó a ello, oponiendo el español y las lenguas eslavas al italiano. En la primera sesión del Congreso había clasificado las naciones, o mejor dicho las lenguas, en principales y secundarias.

Dijo que los sabios alemanes e ingleses conocían los trabajos italianos al través de su traducción francesa. No obstante, añadió, cuando el Congreso internacional se celebre en otro país que no sea Alemania, Inglaterra o Francia, la lengua de dicho país será admitida junto con las tres lenguas oficiales.

*1.º El principio del privilegio de las tres lenguas es defectuoso*

*Esta forma del Congreso no conviene más que a los políglotas.*

En la sesión plenaria leyéronse los estatutos en las tres lenguas. Entonces, ¿por qué no se hizo lo propio con las comunicaciones en cada sesión? Los oyentes de las secciones eran, no obstante, los mismos que en la sesión plenaria.

Tuve muchas dificultades para comprender las comunicaciones alemanas, inglesas (e italianas, porque también las hubo); estaba contento al comprender las comunicaciones francesas. Reflejaban su satisfacción los políglotas. Admiré a los rusos que comunicaban en francés y contestaban en alemán a sus interlocutores alemanes y en inglés a los ingleses. Sin embargo, con frecuencia las salas se vaciaban, no quedando más que congresistas alemanes en unas, ingleses en otras.

Paralelamente con los bacteriólogos, hay filósofos que se ocupan de asuntos morales y de política. Para ellos es el problema de las lenguas. Lo tratan como biólogos. Creen que hay quizás en una lengua algo natural, propio de la variedad de la especie humana. Por ello descartan las soluciones que para ser aplicadas reclamarían una cierta habi-

lidad política: a) lengua universal; b) lengua de la civilización latina... No hay que violentar la naturaleza humana. Debe dejarse subsistir las variedades.

Los políticos tienen frente a sí el problema de las naciones. Quieren aproximarlas. Nunca lo conseguirán decretando la supresión de todas excepto de tres. Hablar es gobernar. Una nación desea pues gobernarse o ser gobernada en su lengua.

Gobernar es ir en busca de la verdad, pero antes de enseñarla y de imponerla hay que encontrarla. Vemos, pues, que las Sociedades Científicas son una parte de los gobiernos y que los Congresos internacionales son parte del gobierno internacional del Universo; nos anuncian su advenimiento.

Cada autor debe: 1.º—Hablar o escribir e imprimir sus obras en su propia lengua y no en una lengua extranjera; 2.º—Debe ser traducido e impresos sus trabajos para ser puestos al alcance de los sabios o de los administrados *de todas las demás lenguas y no de tres solamente*.

Ello exige la creación de una especialidad, la traducción científica, el análisis. Vemos cuán precursores resultan ser los profesores del Institut Pasteur que redactan el *Bulletin del Institut Pasteur* para uso de los que hablan francés.

Ello nos conduce también a la cuestión de la prensa:

Bueno es que haya una edición francesa, otra inglesa y otra alemana para los trabajos importantes. Pero en todas estas ediciones el original debe figurar en la lengua del autor. Que la lengua del lector sea expresión fiel del original, impreso a continuación.

De esta manera tendremos un periódico en dos lenguas y no en una, o mejor dicho, en una multitud de lenguas, incluso el japonés, pero todas traducidas a una sola.

Tal ocurrirá en tiempo a venir, no solamente para la prensa, sino también para los gobiernos.

La Humanidad necesita un gobierno único, como también una prensa única. Pero que este gobierno respete las lenguas, la prensa, las costumbres de todas las naciones, que son variedades de la especie humana.

Tan sólo los sabios y los filósofos, es decir, los gobernantes especializados y los gobernantes generales, con exclusión de los militares (quien dice militar dice *desacuerdo*) forman esta agrupación universal, de la que son prueba fehaciente, a base de unión, los Congresos internacionales.

2.º—*El principio de hacer analizar anualmente por el comité de una de las tres lenguas todos los trabajos que se hayan publicado en esta lengua no es bueno, excepto si el profesor que analiza es un sabio.*

Un congresista expuso en la sesión plenaria el caso de exclusión por un comité nacional y pidió que el excluido pudiera, a pesar de ello, ser admitido en la sociedad internacional.

El presidente declaró que la decisión del comité nacional sería inapelable, pero que todo el mundo, sin excepción, tendría derecho a participar en los Congresos a condición de pagar la cuota correspondiente.

Me he acordado que en otro Congreso, el Congreso Internacional de Historia de las Religiones (París 1927) dos opiniones estuvieron en pugna sobre este punto, sin que fuera posible ponerse de acuerdo.

Coulton recomendó la creación de una Academia internacional, compuesta de los sabios más eminentes, que tendría autoridad soberana en cuestiones de Historia de las Religiones. Esta Academia debería hacer imposible el retorno de la Inquisición, en la que sabios en Historia de las Religiones fueron quemados vivos.

Loisy reclamó la libertad de los sabios. Antes prefiere no los haya a que estén sometidos obligatoriamente a cualquier Academia, porque todas son capillitas, peñas de amigos.

Todos los que tuvieron la satisfacción de asistir a esta discusión entre Coulton y Loisy, que no llegaron a ponerse de acuerdo, experimentaron una sensación inolvidable.

Hay dos jerarquías: La Gubernamental actual, fundada unas veces en la potencia militar, — aquella que no quería Wilson — y otras en el número, en el sufragio del pueblo; y la científica, la de los especialistas, fundada en el sufragio, no ya del pueblo, sino de los sabios de la misma especialidad.

La libertad sería preferible; pero el hombre vive en sociedad y a los sabios corresponde obviar los defectos de sus Academias y hacerlas independientes de los gobiernos que se apoyan en la potencia militar o en la del pueblo ignorante, y convertirlas en imparciales para con sus propios sabios.

Es la cuestión de la jerarquía, la del mando, que tenemos delante. Pero ante todo, descartemos con Renan el

número y adoptemos con él la aristocracia intelectual, la especialidad. Que sobre la misma ciencia, el sabio esté sometido a la competencia y a la selección, tal es lo que prefiere Loisy. Después, una vez distinguido por los otros sabios, bueno que éstos le ayuden intelectualmente (cooperación).

Ello no ha de ser obstáculo para que pueda ser ayudado desde el punto de vista económico en los comienzos de su carrera. La Academia de Coulton se apoya, en realidad, en el terreno económico, en tanto que la de Loisy se mantiene en el terreno del espíritu.

El espíritu debe ser dejado libre; pero debe ser ayudado, puesto que un espíritu es inseparable de un cuerpo.

Los comités de análisis nacionales son de orden espiritual, puesto que aprecian el valor de los trabajos. Pero son también de orden económico, puesto que permiten a los sabios comunicarse entre sí. ¿La comunicación es de orden espiritual o económico? Lo ignoro. Quizás se mantiene espiritual. Y lo económico probablemente no se aplica (bajo el reinado socialista futuro) al dominio de los sentidos. Quedará confinado a la esfera alimenticia, a la protección del cuerpo y a su transporte.

Con placer hemos transcrito el anterior artículo, de "La Medicina Internacional Ilustrada" (Octubre 1930-París), en que el Dr. Neveux, sin llamarse esperantista, demuestra que siente el problema de la lengua internacional.



#### DUA ELDONO DE "KATALUNA ANTOLOGIO".

La presado de tiu granda verko preskaŭ finiĝas. Estas jam presitaj 20 el la 26 kajeroj 16-paĝaj, kiuj konsistigas ĝin, kaj estas sub preso la restantaj. Pro la peza laboro korekti presprovaĵojn de la 416 paĝoj de tiu verko kaj pro la redakto de *Iberia Esperantista Revuo* kaj *Kataluna Esperantisto*, S-ro Jaume Grau Casas ne povis ankoraŭ respondi al amasiĝintaj leteroj de geamikoj enlandaj kaj eksterlandaj. Li petas pardonon al ĉiuj kaj esperas baldaŭ denove ĝui la amikan interkorespondadon.



**MIA VOJO.**

Mi levas mian kapon en ĉielon,  
 sed per piedoj staras sur la ter';  
 nur idealojn vidas kiel celon,  
 sed nutras min per krudreala ver'.

Sur montoj kreskas mia sorĉa floro,  
 sed en la valoj kuŝas mia pan',  
 altiras la animon ĉiu foro,  
 sed ankre tenas ĝin la karna man'.

Al ĉiu bel' mi venas tra la tera,  
 tra la dolora aŭ ĝuiga prov';  
 sen tiu voj' ĝi estus nur ĥimera,  
 tuj paliĝonta post la brila nov'.

Samtial preĝas mi dum ardaĵ kisoj  
 kaj pliĉastiĝas en volupta trem',  
 kaj la anim' la blankon de narcisoj  
 ne perdas en frivolo de l' poem'.

NIKOLAO HOHLOV, L. K.

**EL MEU CAMI.**

Envers el cel ma testa sempre s'alça,  
 però pels peus a terra estic lligat;  
 bells ideals el meu voler encalça,  
 però em nodreix la crua veritat.

Creix en els cims ma flor de meravella,  
 però en les valls només trobo el meu pa;  
 per als meus ulls, sols llunyania és bella,  
 però em reté ben prop carnosà mà.

Tota beutat, per ruta aspra o planera,  
 sols quan faig via adalerat, sorgeix;  
 sense l'esforç Beutat fóra quimera  
 que tot seguit ja minva i s'esvaeix.

Prego només, quan beso amb boca encesa,  
 i em faig més cast en plena voluptat;  
 mon esperit no perd l'alba pureza,  
 i en el meu vers no hi ha frivolitat.

Trad. catalana de JAUME GRAU CASAS, L. K.

## VI ESTAS LA PACO, de Gregorio Martínez Sierra.

## I

(Fino.)

Ŝi vidviniĝis en la aĝo de apenaŭ kvardek jaroj, juna de korpo kaj spirito, kun tri infaninoj aĝaj je dekdu-dekkvin jaroj, gajaj kaj malgrandetaj kiel ŝi, kaj kun unu dekok-jara knabo serioza kaj grandaĉa: la larmoj, per kiuj infaninoj kaj patrino ploris la mortintan indiano'n (1), sufiĉus ŝveli riveron de legendo akvoriĉan kaj maldolĉan; la amo konsolis tamen la knabinojn, kaj post malmulte da tempo Agustina, Clara kaj María Eugenia, bone edziniĝinte, foriris de la palaco meze de kisoj kaj larmoj de panjo. Nur la knabo, Juan Antonio, ne volis edziĝi: li sin fordonis al studado de maljunaĝoj, polvohavaj libroj, ŝtonoj roditaj de la multjaroj, feraĵoj kaj kupraĵoj plenaj de rusto kaj verdigro; krom tio li adoris sian patrinon kaj estis decidinta ne disiĝi je ŝi; de lia tempo restis tie la incensiloj, la kaldronetoj, la teleroj, la kupraj lampoj, kiuj ornamas la salonon de la bona sinjorino; ŝi alkutimiĝis tiel ŝati ilin, kiel siajn cignojn kaj florojn, kaj ŝi sin rigardis en ilin, kiel en la akvon de siaj fontanoj.

Juan Antonio atingis la aĝon de tridek jaroj; forkuris aliaj du jaroj; jam la patrino kredis, ke li neniam edziĝos, kiam revenante de unu el siaj vojaĝoj al fremdaj landoj en serĉo de kruĉoj kaj ŝtofoj, li portis kun ili virineton blondan kiel la lino, blankan, rozsimilan kaj facilrompeblan kiel la porcelano, kun okuloj blua kaj manoj kristalecaj; ŝi estis nomata Lily kaj parolis lingvon dolĉan kaj nekonatan, kiu al donja Margarita ŝajnis babilado de birdoj.

La palaco, iom maljuniĝinta, rejuniĝis tiam per rideto nova, rideto eble viol—kaj grizkolora, ĉar Lily neniam bruis, kaj ŝia feliĉo, pli ol gaja, kutime estis emocia. Donja Margarita restadis mire rigardante sian bofilinon ĉiun fojon, kiam ŝi vidis ŝiajn okulojn pleniĝantaj per larmoj pro granda ĝojo; ŝi ne komprenis, kial oni povas plori pro io alia ol sufero; en ŝia intelekto apenaŭ komplikita, rido, feliĉo

---

(1) Ordinare estas nomata *indiano* ĉiu persono, kiu revenis de Ameriko, kie li estas riĉiĝinta, en Hispanujon.

kaj kanto estis sinonimaj, kaj la ploro, unika formo de la malĝojo.

Tri jaroj de edzeco estis pasintaj, kiam Lily naskis unu *baby'n*, kiun ili nomis Ana María; du jarojn poste ŝi mortis, kaj kvar jarojn pli malfrue, mortis Juan Antonio: tiel falis la profundaj ĉagrenoj sur la antaŭe gajan palacon de Aldana, kaj restis solaj la *baby* kaj la avino funebre vestitaj. La tempo estis portadanta novajn malgajigojn. María Eugenia forveturis Amerikon; Agustina kaj Clara mortis, kaj alia orfo venis en la palacon. Li estis Agustín, la sola filo de Clara, kvar jarojn pli aĝa ol Ana María: kiam li alvenis sub la protekton de la avino, li estis ĵus atinginta dek-kvar jarojn: li estis fortika, bruna, malkvieta kaj facile kortuŝebla. Vidante lin multajn fojojn senmotive plorantan, donja Margarita rememoris je Lily, kaj vidante lin ridantan pro nemulte pli granda kaŭzo, ŝi elmemoris sian propran junecon: la knabo estis kiel ŝtono ĵetita en la trankvilan akvon de la vivo de avino kaj nepino: la vojejoj de l' parko, falintaj en silenton, denove pleniĝis de bruo; en la salono liaj subitaj movoj kaj lia pasia parolo frakasis la ritmon de la jam malrapidaj movoj de la maljunulino, de la tre malpezaj de l' infanino kaj de iliaj voĉoj, mallaŭtaj pro maljuneco—unu, pro natura mildeco—la alia.

La nova vivo, kiu unu fojon ankoraŭ eniris en la palacon, estis unu fojon ankoraŭ renovigo de juneco: la koro de donja Margarita, modelita nedubeble por la feliĉo, metis la animon de ĉiuj siaj mortintoj en tiujn du vivantojn: Ana María kaj Agustín plenigis en ŝia emocia vivo la malplenajon, kiun lasis tiuj filinoj, tiu Juan Antonio. Ekzistas tiel koroj, kiuj ĉe sia propra amemo havas kvazaŭ fonton vivan de feliĉo: ili bezonus absolutan solecon de inklinoj, por ke ili kreu sin senhelpe solaj, kaj tial ĉiu nova amo estas gajeco nova. Nur la perdo de ŝia Agustín restis nekompensata de aliaj amemoj, kaj tio okazis, ĉar la bona *indiano* estis la sola, kiu, en la interŝanĝo de amoj dum tiu kunvivado, donis pli multe, ol ricevis: donja Margarita estis feliĉa ĉe sia patrino kaj avina vivparto, amante filojn kaj nepojn: ĉe sia edzinvido ŝia feliĉo konsistis el tio, ke ŝi lasis, ke oni ŝin amu; ŝi estis por sia edzo, kiel infanino dorlotita kaj dankema, kaj en la aktiveco de ŝia koro, ĉiam tiu forto pasiva restis neuzita, kaj la kavo de la vundo, ĉiam nefermita, gardis la doloron.

—Bonan vesperon, avino. — Ĝi estis voĉo mirinde belsonora, serioza kaj serena. — Ĉu vi estas sola?

—Kompreneble. Manuela estas elpreparanta ĉion kaj Pedro foriris renkonti vin.

—Ĉu renkonti min?

—Jes, jes... Kial vi ridas?

—Ĉar tio min ridigas. Ĉu vi timis, ke mi perdiĝos?

—Mi timis, ke vi ne alvenos ĝustatempe.

—Malsaĝeta avinjo!

—Jes, nun dorlotojn! Mi estas tre kolera.

—Je mi! Kial?

—Pro via trankvilo. Vi sciis, ke Agustín alvenos je la sepa kaj duono, kaj vi foriris al vilaĝo.

—Kaj mi estas ĉi tie je la sesa, preta lin atendi.

—Jes, sed... je la sesa... — murmuris kun eta kolero la maljunulino.

Ana María sidiĝas apud la piedojn de sia avino, prenas ŝiajn manojn, milde karesas ilin, diras al ŝi dorlotajn vortojn, kvazaŭ ŝi parolus kun infano: la ekkolero de l' bona sinjorino malaperas kvazaŭ en sorĉo.

—Ĉu vi estas kontenta, Ana María?

—Treege, avino.

—Nur treege?

—Kiel eble plej kontenta mi estas.

—Kiom trankvile vi tion diras! Se mi estus vi kaj havus vian aĝon!

—Kiom vi farus?

—Ĉu mi scias? Mi saltus, kantus, ridus, petolus: sed vi ĉiam estis sama; kiel via malfeliĉa patro, videble; ĝis kiam li portis sian edzinon hejmen, nenion ni sciis pri lia deziro edziĝi. Kial plaĉas al vi gardi ĉion interne en la koro?

—Ĝi ne estas plaĉo, avino.

—Ĉu do ĝi estas fiereco?

—Ankaŭ ne: ĝi estas karaktero.

—Malbona karaktero.

—Eble jes: mi ja dezirus rakonti al vi miajn ĝojojn kaj ridi kaj kanti je ili, kaj fari projektojn, same kiel al vi plaĉas, kaj plenigi la domon per bruo; sed mi ne povas; kiam mi havas grandan feliĉon aŭ profundan ĉagrenon, ŝajnas, ke oni ĉirkaŭligas mian koron.

—Kaj ili restas en ĝi. Ho, mia infanjo! Mi memoras la tagon, kiam Agustín diris al mi: *Ŝi min amas, avino; ŝi*

*min amas; ni amas unu la alian!* Li estis kvazaŭ freneza, li kisadis miajn manojn, ploradis, ridadis. *Ŝi amas min, avino; ŝi amas min, avino!* Almenaŭ centfojojn li tion diris al mi: vi venis poste...

—Kaj nenion mi diris, ĉu vere? Sed ankaŭ mi estis tre kontenta, kaj ankaŭ mi kisis al vi la manojn, kiel nun.

Ana María kaŝis sian kapon inter la jupon de la maljunulino kaj apogis longatempe la lipojn sur ŝiaj manoj, restantaj senmove ĉe la jupkavo.

Okazis tiam longedaŭra silento, kiun rompis la sinjorino.

—Ana María, ĉu vi estas ploranta?

—Ploranta? Kial?

—Vi ja scias!

—Ne, mi ne ploras. Mi pensas... kiom ŝanĝita ni trovas lin.

—Estas vere: dum kvar jaroj...

—Kvin, avino.

—Kvin, jes, jes; li foriris dum la monato Majo; mi memoras; estis preskaŭ nokte; ni iris lin adiaŭi ĉe la stacidomon; kiam la vagonaro ekforveturis li elmetis la kapon; tiam mi vidis lin lastafoje. Ĉu li scias, ke mi blindiĝis?

—Jes, avinjo.

—Ĉar neniam per la leteroj li diris ion..., sed vi diras al mi, kia li estas. Vi diris, ke lian portreton publikigas tiu gazeto: donu... ĉu ĝi estas tie?

—Tie ĉi, avino.

—Mia filo!... Kial vi ridas?

—Tial ke, anstataŭ kisi lin, vi kisis la statuon.

—Kian statuon?

—Tiun lian: oni fotografis kune la aŭtoron kaj la skulptaĵon; li estas tie ĉi, ĉe tiu flanko.

—Tie ĉi! — La avino promenigis karese la fingropintojn sur la bildo de la nepo artisto. — Ĉu li estas bela?

—Jes, avino.

—Kun siaj gajecaj okuloj kaj siaj kvazaŭŝaŭmaj lipharretoj.

—Nun liaj okuloj estas iom pli malgajaj; lia liphararo pli granda kaj tre bone glatigita; lia barbo...

—Barbo!

—Ja li estas seriozulo. Kaj sur la brusto, ordeno kaj multaj krucoj.

—Ho, mia infanjo, kiel feliĉa vi estos!

—Kaj la granda medalo, kiun ĵus oni donis al li en Berlino: ankaŭ ĝin oni fotografis sur la revuon, inter li kaj la statuo.

—Ĉu similas vin?

—Kiu?

—La statuo.

—Ne, avino.

—Ĉu vi estas certa?

—Certega: ĝi estas virino altkreska.

—Vi ankaŭ estas alta.

—Sed tiu devas esti tre bruna: ŝi havas frunton mallargan, okulojn potencajn, buŝon grandan kun tre maldikaj lipoj, manojn grandajn ankaŭ, sed belajn.

—Kiel ŝi estas vestita?

—Neniel, avino.

—Neniel!

—Jes, kiel... dancistino greka.

—Kiel dancistino... kun mallonga jupo?

—Sen ia jupo: ŝi tenas gazojn en la mano.

—Sed... kiel terure!

—Ĝi estas statuo, avino.

—Kaj tial oni donis al li tiun grandan medalon, kiun vi diris?

—Pro tio.

Donja Margarita enpenŝiĝas dummomente.

—Ne plaĉas al mi, ke li sin dediĉu al tio. — Ana María ekridas. — Serioze mi tion diras.

—Nu, jes; sinjorino avino volus, ke ŝia nepo pasigadu la vivon, skulptante Virgulinojn “del Carmen” por ŝia endoma preĝejo.

—Tute jes; Virgulinojn “del Carmen” kaj Kristojn en la Kruco, ne por mia preĝejo, sed por la tiel belaj katedraloj, kiuj sin trovas en la mondo; kaj sanktulojn kaj sanktulinojn kaj virinojn vestitajn laŭ Dio ordonas.

—Tion ni diros al li, tuj kiam li alvenos.

—Ni ne diros tion al li, ĉar li ridus je mi, kiel ridas vi, kompreneble.

—Mi!

—Vi: mi estas certa, ke al vi plaĉas tiu virinaĉo: ne plu ŝin rigardu, nu!

Per heroa peno de siaj jam preskaŭ malvivaj manoj la maljunulino sukcesis forĵeti de si la revuon, kiu folibarakte falis sur la plankon: Ana María ĝin ne prenis de tie: ĝi res-

tis antaŭ ŝi larĝe malfermite: tiam ŝiaj okuloj iris kaj venis intense de la skulptisto al la skulptaĵo, kaj ŝi pensis: Kvin jaroj... da vivo! Timinda devas esti la vivo, ĉar tiajn postesignojn ĝi lasas sur vira vizaĝo. Postesignojn aŭ cikatrojn? Kaj, fermante la okulojn, ŝi vidis, ĉe la kvietaj malproksimaĵo de sia memoro, la figuron de tiu Agustín tian, kiel kelkajn jarojn antaŭe, kiam plorante kaj ridante, li iris diri al la avino: *Ŝi min amas, ŝi min amas*. Li havis tiam frunton tre blankan, okulojn tre bluajn kaj larĝe nefermitajn; jes, larĝe, tiom multe, ke Ana María estis lerninta legi ilin same kiel sur malfermita libro. Bluaj! Dum la rapide forkurantaj momentoj de emocio tiu bluo intensiĝis, kaj tiel malhela ĝi estis, ke ĝi preskaŭ fariĝis nigra... kaj tiam liaj lipoj kutime tremetis:—buŝo de infano, neniam scianta, ĉu ekridi aŭ ekplori, buŝo babilema kaj franda, malŝparanta entuziasmajn vortojn kaj tiel ŝatanta ŝteli kisojn... Ana María ridetis pro l' rememoro. Knabo timinda, ĉiam post ĉiu arbo kaj en la deflankiĝo de ĉiu vojeto.

Du monatojn post la gefianĉiĝo ŝi, tiel serioza, proponis la problemon disiĝi: kiel li malĝojiĝis tiam kaj kiel li entuziasmiĝis tuj poste! Jes, ŝi estis prava: li, artisto, devas iri tra l' mondo lerni belon, gajni gloron, per kiu ili maturigos sian amon. Ĝloro! Tiam liaj okuloj fulme brilegis, kaj en ilia bluo naskiĝis orkoloraj fajreroj, kaj en lia buŝo, io kvazaŭ kaskado el vortoj, florhavaj ĉiuj kaj plenaj de suno: *Vi estos la edziĝo de la plej fama viro el la tuta tero; mi faros, laboros, revos; ni vivos! La avino ridetis al la entuziasmo de la nepo. Ni estos tre feliĉaj, tre feliĉaj, ĉu vere Ana María? — Ĉu vi skribos?—demandis ŝi serioze. — Ĉiun tagon; kaj mi venos al vi ĉiujn jarojn, ne, du fojojn ĉiujare; kaj vi iros de tempo al tempo fari al mi viziton ĉe tiujn landojn, ĉu vere? Ĉu vere? Vere estas, ke li foriris; kaj vere, ke la gloro venis: vere, ke leteroj iris kaj venis kaj ke la unuan jaron efektiviĝis la promeso pri la vizito: poste la vivo... petola vivo!*

Ana María malfermis la okulojn, rigardis denove la bildon presitan sur la gazeton kaj ripetis dufoje la surskribon: "La honorinda skulptisto Agustín de Aldana." Sub la barbo la lipoj ne estas videblaj, kaj en la okuloj... Kion havas la okuloj? Ja ne estas, kiel la avino diris, ke ili estas pli malgajaj; malgajaj ili ne estas... kvazaŭ lacaj... ankaŭ ne, ankaŭ ne: ne estas laceco nek ĉagreno, kion diras la stranga

rigardo; nek lacaj, nek malgajaj; kio ĝi estas? Ĉu ili ne rigardas rekte kontraŭen, kiel antaŭjarojn? Jes, ili rigardas rekte kontraŭen; jes, ili estas ankoraŭ sinceraj, kiel antaŭtempe: kial do ŝi ne povas malerare legi, kiel antaŭjarojn, tion, kion ili diras? Nekonataĵoj, kiuj eble sin trovas en tiu tiel granda mondo.

Aerbloveto eniras tra la nefermita fenestro: la revuo rebaraktas; je la movo kaj pro malfariĝo de unu faldo de la folio, la bildo de Agustín eniĝas en duonombbron kaj aperas reliefe la bildo de la statuo. Ana María rerigardas ĝin: ĝi estas bela, alta, firma kaj fleksebla kiel serpento, ĝiaj grandaj piedoj scie kuntiritaj en dancopaŝo, grandaj la manoj, granda ankaŭ la buŝo, kiu ridas. Kion pensus la avino, pri tiu rido? Certe ĝi ne diras koran gajecon, nek amon, nek ĝojon, nek naivan mokon. Dentoj akraj, kiuj en la rida kuntiriĝo preskaŭ mordas la lipojn; okuloj potencaj; rigardinte ilin, Ana María preskaŭ ekkrias — potencaj—. La okuloj de la statuo senvualigas subitege al ŝi la sekreton de l' rigardo de Agustín—potencaj!—. La okuloj de Agustín estas venkitaj; kliniĝinte iom, ŝi serĉas en la duonombbron kaj ree ilin rigardas: venkitaj, jes, katenitaj, preskaŭ malkvietaj, preskaŭ timantaj... kion? Petola vivo!

—Kion vi sopiras?

—Nenion, avino.

—Kion vi faras?

—Mi rigardis min en la spegulon.

Kaj estas vere: levinte la kapon por forpeli la malĝojigan eltrovon, Ana María trovis sin portretata en la kristalo de kontraŭa spegulo..

—Kaj kion vi vidas, koketega?

—Mi vidas min.

—Ĉu vi estas tre bela?

—Nu... iel...

—Grandega hiprokritulino! Kian veston vi surmetis?

—La grizan.

—Grizan! Nu, gaja koloro!

—Ja, ĝi estas gaja, avino; plie ĝi havas iom da violkoloro kaj sidas al mi tre bone. Mi metos al mi floron sur la harojn.

—Kiom mi donus, por ke mi vidu vin, mia infanjo!

—Ĉu vi forgesis, kia mi estas? Ĉu vi volas, ke mi tion rakontu al vi? — La avino ridas; Ana María ridas ankaŭ.



—Mi havas okulojn tre nigrajn, tre nigrajn.

—Kiel ĉiam.

—Pli nigrajn, ol iam ajn.

—Ho, Agustín!

—Vere?

—Kion ankoraŭ?

—La harojn alkombitajn sur la frunton, kiel ilin oni nun portas... Mi estas iom pala.

—Kial?

—Mi ne scias; sed ne ektimu, mi havas la lipojn tre ruĝaj kaj tio estas pruvo de bona sano.

—Kion ankoraŭ?

—Nenion plu: tie ĉi finiĝas la ĉarmoj de sinjorino via nepino; almenaŭ la spegulo ne diras alion.

Granda mensogo: la spegulo diras ankoraŭ multon, kiu igas Ana María'n rideti esperplene: tiuj nigraj harringoj, kiuj falas sur la nehele oran frunton, estas krono parolanta pri interna majesteco, pri nobla kuraĝo pensi, pri serena forto certa je si mem. Kompreneble, ke la okuloj estas veluraj; sed interne troviĝas la oraj lancoj pretaj por ĉiaj bataloj. Kvankam la lipoj estas tiel ruĝaj, oni ne povas tamen pensi sole, ke la korpo estas sana, sed ke tia estas ankaŭ la animo, tuta kaj bone armita kiel Minervo, tial ke, tiom kiom ruĝaj, ili estas firmaj, kvankam bone komprenebligas, ke siafore ili scios humaniĝi karesante.

Nun, antaŭ la spegulo, ĉar ŝi estas en grava studo de si mem, la fianĉino ne volas rideti; sed vidiĝas en ŝiaj lipoj la burĝono de rideto, kiu nur atendas por malfermiĝi la sunon de lumhava penso. Kaj jen ĝi floras, ĉar la iluzio venas: vidante sin bela kaj forta, ŝi forgesis la petolan vivon, kiu antaŭ unu momento ŝin malkvietigis, ŝi forgesis la statuo-serponton kaj la timantajn okulojn de l'amato. Ĉu ne estas en la okuloj ŝiaj, forto por ili ambaŭ? Ĉu ne estas—ni diris—la oraj lancoj pretaj batali? Batalo! En la lipoj estiĝas la laŭroj, sed ruĝaj, ĉar ili estas amaj. Kaj la fantazio, pruntante de la koroflugilojn, flugas rapidege; tiom, ke la ambro de vangoj kaj frunto belruĝiĝas kaj la manoj blankaj, malgrandaj, freŝaj aliras estingi la bruladon de l'vizaĝo. Kia ĝuo, la malvarmeto de la manoj sur la fajro de l'vango! Kiel ili dankas la karesan kaŝemon, kiu kovras ilian ruĝeton! Ana María, sub la protekto de siaj manoj, fermas la okulojn: sed baldaŭ denove ŝi malfermas ilin, kaj tra inter la malgrandetaj fingroj ŝi ree alrigardas la

kristalon de la spegulo: ĉe la fundo, ĉe la fundo, malgraŭ ke ili multe kaŝiĝas, ŝi vidas brili la fulmojn, ŝi vidas la nigrajn buklojn, ŝi vidas la ruĝon de la rozo sur ili kroĉita...

—La veturilo estas jungita. Ĉu sinjorino ion ordonas?  
—diras Pedro, enirante kun malrapida paŝado.

—Sed vi ankoraŭ estas tie! Foriru tuj.

Iom poste gajigas la aeron trotado de ĉevalinetoj, sonado de vipskuoj, rapida tintado de tintiloj: la veturilo familia kaj la maljuna bonulo iras renkonti la filon pekintan.

Pekinta, jes; ankoraŭ pli multe, ol kredas la bona donja Margarita: ŝi ne suspektas, ke li tre senama forgesis iomete la avinon, la palacegon kaj eĉ la fianĉinon; ŝi ne imagas, ke monatoj post monatoj estas pasintaj, sen ke li tre malbona estu skribinta unu leteron. Ana María legis al ŝi ĉiu-semajne longajn leterojn plenajn de karesaj vortoj.

La leteroj de la nepo! Ĝuste ili estas la suno de ŝia vivo: la ekstrema maljuneco, kiel la infanaĝo, bezonas la kveron de rakontoj, kaj la aferoj, kiujn Agustín rakontas, tiel similas la rakontojn, kiuj plezurigis ŝin en la infaneco: pasoj tra urboj malproksimaj kaj mirindaj, festoj, triumfoj, lumo, la belo kovrita, tiel super realeco, de ornamoj kaj brilaĵoj iom neprecizaj, sed tiel belaj! kaj fine, tiom da dorlotoj, ĝuste tiuj, kiuj plej multe plaĉas al la avino; la preferata floro trovita en angulo de la mondo kaj sendita el tiel malproksime, la vido de l' ĝardeno, de l' poplaleo, de la cigno sub la akvoŝpruco, elvokata en horo triumfa.

—Kiel bona li estas! Vere?

—Kiu?

—Agustín: ĉiam memoranta nin: eĉ unu solan el siaj ĝojoj li ne lasis nekomunikata al ni: kaj ĉe tiu, kiu—vi diras—estas la plej granda, vi tion vidas, elbordiĝas lia koro kaj ĝi venas hejmen ĝin disdoni, por ke ni lin helpu ĝin surporti.

Ana María ete sopiras: le belruĝo de ŝiaj vangoj subite estingiĝas, la iluzia lumo de ŝiaj okuloj dronas en subita nigreco.

—Vi ne respondas al mi, infanjo?

—Jes, avino.

—Post duonhoro li estos ĉi tie.

Kaj la projektoj komenciĝas; belege estas aŭdi ilin, formulatajn de la sendenta kaj tremanta buŝo per vivego pli

ol juneca, kaj dume la fianĉino restas silenta. La avino decidis, ke la geedziĝo ne povas prokrastiĝi.

—Ĉar la infano—ŝi diras la infano malgraŭ la barbo, kiun ŝi ne komprenas—havas jam tiun gloron, kiun li iris serĉi, kial ni devas atendi, ĉu vere? Ni pasigos la someron kune ĉi tie en la kamparo, kaj en Oktobro vi ambaŭ foriros fari grandan promenadon, por ke vi ankaŭ konu la mondon; kaj ĉe la reveno..., ĉe la reveno sendube vi portos al mi pranepojn, ĉu vere, Ana María?

Trad. el la hispana: JOSEP GRAU CASAS, L. K.



#### BARTOLOMÉ LEONARDO DE ARGENSOLA (1566-1631)

Ho, don Juan, jen, time mi konfesas:  
Elvira neĝe brilas, roze floras,  
Sed el proksimo: ĉio ĉi valoras  
Nur tiom, kiom ŝi por ĝi elspezas.

Konfesu, tamen, se vi bone pesas:  
Ke ŝi mensogi belon tiel povas,  
Ke pura ĉarmo kontraŭ ŝi ne trovas  
Armilojn, ĝiaj argumentoj ĉesas.

Ne miru do, se—estu laŭ destino!—  
Pereon iros mi pro l' falsulino:  
Ĉu mem ne trompas la Natura pompo?

Jen, rave kovras nin la blu' ĉiela,  
Kaj—nek ĉiel', nek bluo. Ĉio bela,  
Domaĝe, estas ja ne ver', sed trompo!

Trad. el la hispana: K. DE KALOCSAY, L. K.

## BIBLIOGRAFIO.

**JARMILOJ PASAS**, de Hermann Haefker. Universala Historio en du volumoj, verkita originale en Esperanto. Kun ses artaj reproduktaĵoj, dek-unu geografiaj skizoj. Eldonis: "Heroldo de Esperanto", Brüssler Strasse 94, Köln (Germanujo). 1930-31.

1.<sup>a</sup> volumo. 245 paĝoj. 16 × 23 cm. Duonlede bindita. Prezo: 9 germanaj markoj. Ambaŭ volumoj (la dua baldaŭ aperos): 16 germanaj markoj.

Unu el la plej valoraj Esperantaj verkoj (eble la plej valoran) ni havas antaŭ ni. Bela koincido de formo kaj enhavo: la universala lingvo al la servo de la universala historio. Korekta kaj preciza stilo, perfekta kaj konciza priskribo. Aranĝo scienca, klara, artplena, alloga. Bona preso, bonega impreso.

Ni devas esti dankaj al la eminenta kompetentulo Haefker, kiu tian valorajn verkis en Esperanto; al la ŝatata redakcio de "Heroldo", kiu, interkonsente kun la aŭtoro, redaktis definitive la manuskripton: al la eldonejo de S-ro Teo Jung, kiu sciis taksu la valoron de tiu verko, kaj kiu per tia eldono lokiĝas en la vico de niaj plej bonaj Esperanto-eldonejoj.

En la antaŭparolo "Esperanto kaj mondhistorio", S-ro Haefker pledas por ke ni risku enkonduki Esperanton en la realan praktikan uzon de la nuntempo, kaj promesas, ke, post sukceso de lia provo disvastigi novan komunan scion inter la popoloj kaj rasoj de la terglobo, komencante per mondhistorio, li atakos aliajn problemojn. Jam nur pro tio la esperantistaro devas plene sukcesigi la eldonon de "Jarmiloj pasas": la plua laboro de la sin montrinta bonega historiisto, en aliaj kampoj de la scio, estos beno por nia lingvo kaj por nia movado.

"Jarmiloj pasas": belega titolo por tiu verko, kiu, en ne pli ol 600 paĝoj, vidigos al ni la pason de la signifaj okazaĵoj tra la historio. Kompreneble ĝi ne havigas al ni la amason da detaloj de la en diversaj lingvoj eldonitaj "Universalaj Historioj" en multnombraj volumoj, sed ĝi prezentas resumon, eĉ kritikan studon de la grandaj historiaj movadoj, de la plej memorindaj faktoj, en maniero tre bela kaj, malgraŭ la iufoje granda scienceco de la temo, per sufiĉe klara difino. Jen kelkaj trafaj esprimoj, per kiuj la aŭtoro komencas siajn priskribojn:

“En ĉiu hirtoriskribado estas certa konkuro inter la *faktaro* kaj *idearo*. Nenombreblaj estas la historiaj faktoj; sed, kiel nuraj faktoj, ili ĉiuj ja estas mortaj kaj enuigaj: vivon kaj intereson ili ricevas nur per la ideoj, kiuj tralumas ilin. Tiujn ideojn ni serĉas, kaj la nombrado de faktoj estas nur rimedo por ili—ni bezonas la faktojn tiagrade, kiel ili komprenebligas la ideojn kaj leĝojn de l’ historia estiĝado. Tial el la faktoj ni aspiras plejeble koncizan ekstrakton. Sed niaj legantoj deziras aŭdi ankaŭ tiujn nomojn kaj faktojn, kiuj precipe el la scienco—ofte ankaŭ el la sciencfabelaro—eniris la internacian fantaziaron kaj pens-trezoron. Mallonge: oni trovu en nia libro almenaŭ la ĉefajn historiajn faktojn, kiujn laŭfrazo “oni devas scii”.

Jen la belaj enkondukaj vortoj pri “mondkreado”: “Kio ekzistas, komenciĝis kaj finiĝos—tiu logiko regas la homon kaj akre igas lin pripensi finon kaj komencon de ĉiuj aĵoj. Tiu pensmaniero kondukas lin de la aperaĵoj al ilia kaŭzaro; li lernas kompreni ĉion kiel sekvaron de kaŭzoj kaj efikoj, kaj per tio li paŝon post paŝo majstras la natu-ron. Fine li staras antaŭ la demando de l’ demandoj: kiel do komenciĝis la tuta mondo, la ekzistantaro mem? Kaj, ĉar ĉie en la mondo li opinias trovi racion kaj laŭcelecon, kaj laŭcelajn aĵojn li konas nur kiel verkojn de iu volanta estaĵo, tial li ankaŭ kredas, ke la mondo iam estis “kreata” de Esto supera kaj potencega sed simila al homo, kaj tiun komencilon de l’ ĉio li nomas Dio.”

Jen konciza difino: “Manĝemo kaj amemo regulas, kiel la individuan vivon, tiel ankaŭ la socian vivon kaj la his-torian.”

Trafaj konsideroj, kiel la sekvantaj, estas tre abundaj: “Ĉu povas esti homo sen arto? Sed—ĉu arto signifas esence nur tiun luksan ludon kiel en la hodiaŭa ĝenerala vivo?”.

“Per la ilaro ja la vivrimedoj de l’ homo multobliĝis, lia besta vivbatalo komencis esti interrompata per tempoj de ĝuo, ripozo—meditado. La ilaro ankaŭ donis la ideon de loĝejo, kiu mem estas laborejo kaj laborilo; kaj valorega ilo ankaŭ estis la fajro, kiu varmigas, lumigas, igas la man-ĝaĵon pli nutra, egaligas la sezonojn, liberigas de vento kaj vetero! Ĝia sorĉa flamdancado en la paco de la loĝejo, kie nur amikoj kaj familianoj ripozis, vekas la pensantan spiriton, la fantazion, la vivĝojon en antaŭe nepripensita intenco—ĝi liberigas la kreantajn fortojn por esprimo de io nova, ĝermanta en la brusto. Ĉi ĉio, kies majstrado en

la naturo de nun plibeligas, pliriĉigas la vivon, en la tempoj ekster la akra batallaboro fariĝas objekto de ĝogija respegulado. Ĝi jam estas io alia ol nura utilo—ĝi estas *beleco*.”

La plano de tiu universala historio estas la jena: AN-TAŬE, enkonduka parto, kaj kvar libroj: Unua Libro (Prahistorio kaj antaŭhistorio); Dua Libro (Antikva epoko); Tria Libro (Meza epoko); Kvara Libro (Nova epoko), kiuj estas titolitaj: EL ĈELO AL ŜTATULO; TEMPO DE DIOJ; TEMPO DE DIO; TEMPO DE SCIO.

La unua volumo enhavas la enkondukon “Antaŭe”, la unuan kaj duan librojn kaj la komenciĝon de la tria; sed ni recenzos nur ĝis la fino de la dua libro, kaj lasos por kiam aperos la dua volumo, la recenzon pri la ceteraj partoj de la verko.

\* \* \*

Kio estas Historio? La scio pri estiĝo de l' mondo estas temo de la natursciencoj; mondhistorio temas nur pri la homo. Nur malgrandega parto de la milionoj da jaroj de l' evoluo el unuĉel-organismo ĝis homo-ŝtatulo formas la enhavon de l' Historio: 6-10000 jaroj. La *skribarto* konservis al ni la okazintaĵojn tra la historio, sed estas eble eĉ pli gravaj kaj certe pli fidindaj la nevolitaj manifestaĵoj de l' homo: la produktaĵoj de lia arto kaj tekniko, trovitaj per *elfosado*. Ni ne nur observu amasojn da faktoj, sed eltiru el ili la leĝojn de la vivo. Leĝojn, sed ne dogmojn. Tamen: verojn, ne opiniojn. Historio ne estas romano, ĝi estas scienco. Ni povas dividi ĝin: 4000 jarojn antaŭ Kristo ĝis 375 post Kristo, *antikva epoko*; 375 p. K. ĝis 1492 p. K., *meza epoko*; 1492 p. K. ĝis nun, *nova epoko*. Sed la historio estas ja nur lasta parto de la ĝenerala homa evoluo. En la prapasinteco ni diferencigas du epokegojn: la evoluon de l' homo el unuĉelulo tra besta formaro ĝis la decida formiĝo de l' cerbo kiel supera organo, pro kio la homo estiĝis tiu majstro de la bestoj—la vera *homigo*, kaj de tiam la longan antaŭhistorian tempon, en kiu li, laŭ la dokumentoj restintaj en la tero, evoluis el duonbesto je ŝtatulo. Tiun tempon oni taksas je 100.000 ĝis 200.000 jaroj. Do:

*Prahistorio—milionoj da jaroj*

*Antaŭhistorio—ĉirkaŭ 200.000 jaroj*

*Historio—ĉirkaŭ 6000 ĝis 10000 jaroj.*

\* \* \*

El iam ekzistinta unuĉelo evoluis la homo. Ĝi trakuris longan vicon da bestformoj. La decida paŝo estis la kreskado de l' cerbo. Unuĉelulo, multĉelulo, gastrulo, vertebrulo, brankulo, amfibio, mambesto, simio, simihomo, homo. Studo pri ĝiaj kapabloj, penso, lingvo.

La tero, sur kiu la homo vivas, bezonis proksimume 1500 milionojn da jaroj por ke ĝia surfaco rigidigu, por ke iu vivo povu ekĝermi sur ĝi. Vivo aperis kaj eble dum 600 jarmilionoj elvolvis sian mirigan formaron. Oni diferencigas kvar epokojn: *arĥaon* (eble disvolviĝis la primitiva ĉelularo), *paleozoan* (amfibioj, insektoj, fiŝoj, reptilioj—plantoj kriptogamaj), *mezozoan* (unuaj mambestoj kaj plantoj fanerogamaj), kaj *kenozoan*, kiu etendiĝas ĝis la nuntempo. Ĝi partiĝas je du "formacioj": la *Terciario* (abundaj mambestoj kaj plantoj dikotiledonaj) kaj la *Kvartaro* (certa apero de la Homo: eble ekzistis la homo terciara). En la kvartaro estas du periodoj: *diluvio* kaj *aluvio*. Oni trovis restojn de homoj el diversaj epokoj kaj oni starigis la rasojn: Neandertal, Aurignac, Cro-Magnon, kaj aliajn.

Laŭ la pli kaj pli perfektigantaj *ilaroj* de la homo, oni starigis la temp-aĝojn *ŝtonan* (antikvan kaj novan: paleolitikan kaj neolitikan); *bronzan* (kiu plejparte jam apartenas al la tempo *historia*, nome tiu tempo, de kiu konserviĝis ankaŭ *skribaj* dokumentoj); kaj *feran*, nun daŭrantan. Per la eltrovo de *ŝtalo* estis granda teknika progreso por nia nuna civilizacio.

"Ni staras antaŭ la sojlo de l' historio kaj, antaŭ ol eniri, ni haltu. Estas necese pripensi, kia nun estiĝis la homo, kaj kia estis la neklara devigo, kiu lin pelis en la historian kaoson. Ĉar nur urĝa neceso, ni ja scias, kaŭzas ĉian homan evoluon je bono kaj malbono."

Al la homo prezentiĝas *laboro*, ofte laboro *intelekta*, li plene sentas la *belecon*. Sed ekzistas emo *posedi*, estiĝas *diferencoj*, *armiloj*, malsameco de *armilaroj*, *milito*. Sur la scenejo trapasas longa vico da historiaj scenoj. Ĉefrasoj. Sumero-babilonaj ŝtatoj. Progreso de astronomio, *matematiko*. Astraj religioj.

\* \* \*

El Oriento—lumo. Historio pri Babilono, Egiptujo, Asirio, Fenikio, Palestino, Grekujo, k. a. Artoj, religioj. Pi-

ramidoj, hieroglifoj. Greka civilizacio. Aleksandro la Granda. Tre belaj paĝoj pri amaso da intereseĝaj punktoj.

Romo. Komencoj. Sociala solidiĝo. Romana imperio. Helenismo kaj Kristanismo. Jesuo el Nazareto. Kreskas la Eklezio.

\* \* \*

Per la antaŭa skizo la leganto komprenos, kiom interesa estas la verko "Jarmiloj pasas", eĉ se ĝi ne estas perfekta iurilate. El lingva vidpunkto, mi malaprobas la sufikson *end*, la formojn *ekde* (de, de post) kaj *dum ke*, la vorton *obteni* kaj la uzon de *ĝis* anstataŭ *eĉ* ("Nia lingvo estas plena de ĝi *ĝis* en la ĉiutagaj frazoj"). Sed mi aprobas kelkajn neologismojn, speciale la formon *loktenanto* (anstataŭ *leŭtenanto*). Pri preseraroj, la libro estas perfekta. Kvankam mi tralegis ĝin dufoje, eĉ kelkajn pecojn multfoje, mi trovis nur unu eraron: *hibilia* anstataŭ *biblia*, p. 119. Tio estu dirata, por montri ke mi plenumis la peton "al sinjoroj recenzontoj" ne nur supraĵe legi la libron.

Mi atendas kun vera intereso la duan volumon de tiu meritplena verko, pri kiu mi ripetis gratulon al ĉiuj kunlaborintoj.

J. G. C.

## CURSO DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA.

Constará solamente de diez lecciones y tendrá carácter elemental. Precio de matrícula: 25 pesetas.

Previo el pago de la matrícula, el alumno recibirá la primera lección, mecanografiada o impresa, y una hoja de ejercicios que deberá devolvernos debidamente llena.

Seguidamente se le mandará dicha hoja, corregida y acompañada de un breve comentario, la segunda lección y la segunda hoja de ejercicios. Y así sucesivamente.

Más adelante estableceremos otro curso de carácter superior. Todas las correcciones y explicaciones serán visadas por nuestro Director. Buscad alumnos para este Curso y contribuiréis al sostenimiento de nuestra Revista.



## REVUO DE REVUOJ.

*Literatura Mondo*, Budapest, n-ro 1, 16 paĝoj grandformataj, kun ilustraĵoj. 8 kovrilaj paĝoj. Jen la unua numero de la dua periodo de la plej bona gazeto en Esperanto. Sub la direkto de K. de Kalocsay kaj Julio Baghy. Rimarkindaj: *Familiopatro kaj Maljuna fraŭlo*, du sonetoj de Kalocsay. *Skatoleto da ĉokoladoj*, sprita rakonto de K. R. C. Sturmer. *Halinjo*, de Lidja Zamenhof.

*Internacia Medicina Revuo*, Bruxelles, 9a jaro, n-ro 1, januaro 1931. 24 paĝoj, kovriloj. Rimarkindaj: *Eksperimento en biologio*, de D-ro Karel Klein. *IX Kongreso de Universala Ligo por Seksa Reformo*.

N-ro 2, feb. 1931. 12 p., kovrilo. Rimarkinde: *La laŭpunge prirespondeco de kuracistoj*.

*Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio*, Paris, n-ro 2. 8 p. kun kovrilo. Rim.: *Kvara aldono al la Universala Vortaro*.

N-ro 3. 32 p., kovrilo. Rimarkinde: *La nomoj de la necesperantaj literoj kaj signoj*, de Walter Lippmann. *Listo de verkoj publikigitaj de Lingva-Komitatoj*.

*Multlingva Intersteno*, Duisburg, n-roj 1, 5, 6, 7, 8 kaj 11. 4-paĝaj numeroj, tute skribitaj, en diversaj lingvoj, laŭ la internacinalstenografio.

*Tutmonda Intersteno*, Duisburg, n-ro 5. 4 p. en ordinara skribo. Rim.: *Arteca sentado en lingvo kaj skribo*, de F. von Kunowski.

*Flandra Esperantisto*, Antwerpen, n-ro 9, marto 1931. 16 p., kovrilo. Unu el niaj plej bonaj revuoj. Rimarkinde: *Statutoj de Flandra Esperanto-Instituto*. Ni dankas la aŭtoron mension pri apero de IER.

*Kristana Revuo*, Hornchurch, n-ro 7, februaro 1931. 16 p., kovrilo. Rimarkindaj: *18 Sonetoj pri Jesuo*, de Geo. Macdanold, el la angla trad. A. T. Maling. (Ni ne scias, ke en angla lingvo ekzistas sonetoj sen rimo kaj pli ol 14-liniaj.) *Novaĵoj pri Rusujo*, iom tendenca informo pri la nereligio de Sovetunio.

*Monda Kuriero*, Sarajevo, n-ro 1-2, jan-feb. 1931. 8 paĝoj grandformataj. Pri komerco, trafiko, ktp. Ni miris, ke la unuan paĝon de komerca revuo okupas poemo al la reĝo Aleksandro I<sup>a</sup>.

*Katolika Vivo*, Paris, n-ro 3. 1 feb. 1931. Dusemajna, tre

bone presita, grandformata, 6 paĝoj. Rim.: Papa encikliko *La edziĝo laŭ la kristanaj principoj*.

*La Nova Epoko*, Paris, n-ro 88, jan. 1931. 16 p., kovrilo. Literatura organo de "Sennacieca Asocio Tutmonda". Rim.: *La laborista Esperanto-movado antaŭ la mondmilito*, de G. P. de Bruin. Bela revuo, malgraŭ la ĝena uzo de k anstataŭ kaj.

*Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*, Tallinn, n-ro 107, jan. 1931. 8 paĝoj, kun abunda teksto. Rim.: *Kroniko*, modele aranĝita.

N-ro 108, feb. 1931. Rimarkinde: *Pri la Estona Antologio*, de Helmi Dresen.

*Sennaciulo*, Paris-Leipzig, n-ro 332, 12 feb. 1931. Semajna oficiala organo de SAT. 8 grandaj paĝoj. Rim.: *Hispanujo, ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ*.

*Skolta Heroldo*, Paris, n-ro 46, jan. 1931. 16 p. kaj kovrilo. Bele aranĝita, ilustrita kaj tre taŭga por la progando de nia lingvo. Rimarkinde: *Raporto pri kampado de Zaragoza gaskoltaro en la valo de Oza*.

*La Juna Batalanto*, Köln, n-ro 25, jan. 1931. 12 p., kovrilo. Organo de Mondjunularo Katolika. Rim.: *Papoj kontraŭ deviga militservo*. Ni dankas la mencion pri IER laŭ jena maniero: "La unua numero montras, ke la revuo ĉefe serĉos sian taskon sur la literatura kampo, kie ĝi vere estas atentinda."

*Aŭstria Esperantisto*, Wien, 8<sup>a</sup> jaro, n-ro 2, feb. 1921. 12 p. Rim.: *Edukado laŭ Montessori*. Dankon pro la raporteto pri apero de nia "revuo, kun tre interesa enhavo."

*Kataluna Esperantisto*, Barcelona, n-ro 174. 16 p., kun kovrilo. Rim.: *Konservado de la voĉo de nia Majstro sur gramofondiskoj*, de Joan Gili Norta. *I tanmateix es mou!* respondo al artikolo aperinta en "Mirador". Ni dankas la detalan raporton pri la enhavo de nia unua numero.

*Mirador*, Barcelona, n-ro 92, 30 oktobro 1930, semajna, katalunlingva, aperigis duonfavoran artikolon pri Esperanto, de Andreu A. Artís. Ĝi havis la titolon, en Esperanto: *Barcelona Esperantista Movado*, okupis tri kolonojn en centra paĝo, rememorigis pri la V<sup>a</sup> Universala Kongreso kaj reproduktis fotografajon de la tiama kongresanaro.

*La Gaceta Literaria*, Madrid, n-ro 92, 15 oktobro 1930, publikigis hispanlingvan artikolon *La expresión literaria en Esperanto*, verkitan de nia direktoro.

*La Publicitat*, Barcelona, 13 feb. 1931, katalunlingva ĵur-

nalo, aperigis tre interesan artikolon de S-ro Delfi Dalmau, titolitan: *L'idioma de l'escola.—Política i pedagogia*, kun fina aludo al la lingvo de Zamenhof.

*Mirador*, Barcelona, 19 feb. 1931, publikigis artikolon de S-ro D. D., pri *Una Exposició de Nines*, petantan ke oni sendu katalunajn pupojn al la japanaj esperantistoj, kiuj aranĝos ekspozicion pri ili.

*El Diluvio*, Barcelona, 12 feb. 1931, aperigis en hispana lingvo bonan artikolon por Esperanto, de S-ro A. A., de la Akademio Enciclopedia "Espero".

*Revista del Ateneo*, Jerez de la Frontera, n-ro 54. Rim.: *La ciencia en la civilización moderna*, de Pedro M. González Quijano. *El Espejo y el Camino*, de Teófilo Ortega. Sur la kovrilo de tiu revuo oni mencias ricevon de preskaŭ ĉiuj esperantaj gazetoj.

*El Socialista*, Las Palmas, 29 januaro 1931, semajna gazeto, publikigis interesan artikolon *La Religión del Dios-Sol*, verkitan de iu, kiu nomas sin "Esperanto".

*El Principado*, Gijón, n-ro 100, jan. 1931. Katolika gazeto, kun malgranda Esperantofako.

*Schola et Vita*, Milano, 5<sup>a</sup> jaro, n-ro 11-12, nov-dec. 1930. Organo de "Academia pro Interlingua". Rim.: *Ad sincero fautores de lingua auxiliare internationale*. La "latino sine flexione" iel plaĉas al mi, ĉar ĝi eble estas la sola lingvo "internationale", kiu ne estas parazito de Esperanto. Aliflanke, ĝi estas tre *komprenbla*: sed kiuj scias *esprimi* sin per ĝi? Ne sufiĉas, ke iu lingvo estas unuavide *legebla*; ĝi devas esti *uzebla* de skribantoj kaj parolantoj, kiuj, komprenble, ne povas *unuaskribe* aŭ *unuaparole* uzi ĝin. Do *facile komprenbla* estas trompo: oni devas pruvi, ke temas pri lingvo *facile lernebla*. La adeptoj de *latino sine flexione*—se ili ne estas latinistoj, istoj de la latino *cum flexione*—restos eternaj aŭdantoj de muziko, sed neniam fariĝos veraj virtuzoj. Ili konvinkiĝos—ke nur S-ro Peano ludas la violonon!

## EL MOVIMIENTO ESPERANTISTA MUNDIAL.

### EL CORREO Y EL ESPERANTO

Por carta circular N.º 47/2251 del 19 de febrero de 1930, publicada en el órgano oficial "Telegrafopoŝtenski izvestija" (N.º 8/10, marzo 1930), el Director General de los CTT Búlgaros volvió a recomendar el Esperanto a todo el personal del servicio telegráfico.

Inmediatamente se organizó en la Escuela de los CTT de Sofía un curso de Esperanto oficialmente subvencionado.

### EL ESPERANTO EN LA UNIVERSIDAD

En las Universidades de Ginebra, Zagreb y otras, hay ya una cátedra de Esperanto. También se ha introducido ya el Esperanto en un número considerable de escuelas técnicas. El Dr. Buchanan, hijo de un comerciante escocés que murió últimamente en Liverpool, ha dejado 4 mil libras esterlinas para que se cree una cátedra de Esperanto en la Universidad de dicha ciudad. El Esperanto se enseña ya en la Universidad de Liverpool y varios profesores eminentes son adeptos de la lengua internacional.

### EL ESPERANTO EN LOS TRANVIAS

El número de los empleados de tranvías que aprenden el Esperanto aumenta día tras día. La Dirección de los tranvías de Düsseldorf acaba de decidir que los empleados hablando el Esperanto se distinguirán por un brazal con la palabra "Esperanto".

### LA POLICIA Y EL ESPERANTO

La policía usa también el Esperanto desde largos años. A fin de poder trabajar sobre una base más extensa y en contacto con la organización oficial del movimiento esperantista, la organización de los agentes de policía esperantistas acaba de reconstituirse en Leipzig bajo el nombre de "Internacia Polica Ligo".

## EL ESPERANTO AL SERVICIO DE LA POLITICA.

El Comité de Relaciones Exteriores en Shanghai, publicó, hace poco, un folleto en Esperanto acerca de la cuestión de Shantung. Recordemos la Gran Guerra y también después, se ha empleado el Esperanto con grandísimo éxito, en diferentes países y con fines políticos, sobre todo para la propaganda de la prensa por el extranjero.

## LAS AUTORIDADES Y EL ESPERANTO.

El Esperanto goza, desde hace pocos años, del favor de un número considerable de autoridades del mundo entero.

Este año, el Parlamento sueco ha adoptado—sin discusión alguna—la proposición de subvencionar, como el año pasado, los cursos de Esperanto para maestros. La cantidad de 2 mil coronas ha sido fijada de nuevo en el respectivo presupuesto.

El Consejo Municipal de Courtrai (Bélgica), ha dado una subvención de 1000 francos para cursos populares de Esperanto, poniendo gratuitamente a la disposición de dichos cursos los locales necesarios.



## PRE "IBERIA ESPERANTISTA REVUO".

"Tre kore mi gratulas vin pro la bela, interesa Revuo, kiun vi ĵus sendis al la Prezidanto de "Esperantista Akademio".—TH. CART. Paris.

"Us felicito ben sincerament pel primer número de *Iberia Esperantista Revuo*. Compteu amb el meu "donaco" de protector. Les coses ben fetes i ben orientades no tenen preu".—DELFI DALMAU, Barcelona.

"Mi ricevis la unuan numeron de IER; ĝi tre plaĉis al mi. Mian sinceran gratulon". FRANCISCO AZORÍN, Córdoba.

“He rebut el primer número de IER, que trobo força bé i interessant. Espero que serà de llarga i progressiva durada la publicació”.—S. ALBERICH-JOFRE, Barcelona.

“De antaŭ longe estas de mi bone konitaj la kompetenteco, la laboremo kaj la obstino de S-ro Grau Casas, glora poeto, mirinda oratoro, eksterordinara verkisto. Lia nomo estas sufiĉega garantio por iu ajn esperantista entrepreno, eĉ se ĝi estas tiel malfacila kaj kuraĝa kiel la publikigo de gravega gazeto.

Pro tio, la apero de *Iberia Esperantista Revuo* sub la aŭspicioj de Jaume Grau Casas, tute ne surprizis min. Kaj mi ne nur deziras, sed antaŭvidas plenkonvinkite, la gravegajn rolojn kiujn ĝi ludos, ne nur en Iberio, sed en la universala gazetaro.

Allogitaj de S-ro Grau, jam alvenis al ĝia enhavo la admirataj nomoj de Kalocsay, Martínez Sierra, Domènech, Maeterlinck, Erdős, Dantas, Mulford kaj Rubén Darío. Esperable en venontaj numeroj pliriĉigos ankoraŭ tiun enhavon la subskriboj de ĉiuj eminentaj esperantistaj verkistoj, precipe de Hispanujo kaj Portugalujo.

Mi min sentas fiero pro la apero, en mia patrujo, de tiel mirinda revuo”.—MANUEL MAYNAR BARNOLAS, Zaragoza.

“Hacemos a usted presente nuestra felicitación por su acierto en publicar tan buena revista, pues hora es ya de que escriban nuestros órganos en España plumas bien capacitadas que, con una orientación prudente y de altas miras, nos agrupen a todos, convirtiendo la publicación de usted en el órgano oficial de la ansiada Confederación que acaba de nacer en Zaragoza frente a las torpes imposiciones...” — M. CANTALAPIEDRA, Presidente de SENDEPENDA ESPERANTA GRUPO, Oviedo.

“Mi devas kore gratuli vin pro la unua numero de IER, tre interesa laŭ enhavo, tre belaspekta. Sendube ĝi ja estas la unua, laŭ graveco, en Iberiaj landoj, kaj ĝi estos ankaŭ en la unuaj vicoj de tutmonda literaturo”.—AMALIA NÚNEZ, Pamplona.

AL JAUME GRAU CASAS.

Skribante nun al la poet'-riĉul'  
de harmoni ' en Barcelono,  
mi sentas, ke mi estas la pekul ' ...  
Ho! pli malbone... estas ŝtono.

Ne... pli malbone, ol sensenta ŝton ' .  
Ŝton ' donas eĥon al poeto...  
De vi alvenis poezia son '  
kaj mi silentis... mi, briketo.

"POEMOJN AMAJN" mi ja ĝuis jam,  
veran poeton mi eksentis,  
en mi al vi naskiĝis am ' ...  
Kaj mi—pardonu!—mi silentis.

De viv ' klopodojn nun malbenas mi...  
Jen estis kaŭzo de silento...  
Sed koron tuŝis via harmoni ' :  
ne estis mi ja ŝton ' sen sento...

Vi ĝin divenis... Kara la pardon ' ...  
"POEMOJ NOVAJ" ame sonas,  
de vi senditaj ne el Barcelon ' ...  
Nun ŝtono dankan eĥon donas.

Sed mi ne trovas plenajn de inspir ' ,  
sufiĉajn vortojn en inkujo,  
por ke mi krii, ke naskiĝis lir '  
de *Heine*... en Esperantujo.

Jes! en ĝardeno de la poezi '  
pro najtingalo mi ekstazas...  
Ne ekraviĝi estus herezi ' ...  
Prenu saluton, ho Grau Casas.

LEO BELMONT, L. K.

Varsovio, 7. oktobro 1928.

---

Prezo de NOVAJ AMAJ POEMOJ: 1 peseto.

EN LA PROKSIMAJ NUMEROJ APEROS:

- PROBLEMO DE LA PATRECO, de Jakob Schmid.  
LA ŜNURTIRO, de M. E. Francis. Trad. Louise Briggs.  
ĈU IO BONA ESTIS EL NAZARET?, de Emma L. Osmond.  
LA LINGVO ESPERANTA KAJ LA HEBREA, de Dr. Leopold Dreher.  
LA ROMANO "JEAN CRISTOPHE" DE ROMAIN ROLLAND, kritika studo de Jozefo Major.  
LA SANKTA GRALO, de Jakob Schmid.  
LA BIENULINOJ, de Joseph Berger.  
LA NOVA VIVO, de Ivan Sirjaev  
PRI AKTORARTO, de Helena Hempel.  
LA ĈARMO DE MUZIKO, de Emma L. Osmond.  
L'ARLESANINO, de Alphonse Daudet. Trad. Jan van Schoor.  
LA STELPLENA ĈIELO, LA PLEJ GRANDIOZA ARGUMENTO POR LA EKZISTO DE DIO, de Victor Kolb. Trad. Karl Friedl.  
STUDOJ PRI LA LINGVO KAJ LITERATURO DE MALGRANDAJ POPOLOJ, de Ed. Jung.  
SOCIA PROSPERADO, de J. Kramer.  
ĈU LA BESTOJ ANKAŬ HAVAS ANIMON?, de Hans Windisch-Sartowsky.  
LA REĜO, de Francesco Pizzi.  
LA POEZIO DE JULIO BAGHY, humora monologo de E. Aisberg.  
LA LERNEJO DE ĈEVALIDOJ, de la dekdujara esperantisto. Francisco Azorín.  
HEJMO, HEJMLANDO, HEJMECO, de Fischer-Friesenhausen. Trad. Joseph Berger.  
LA NATURO DE FELICECO, de Sidney J. Smith.  
SENTENCOJ DE L' PRIORO, Kanto XVII de "Dreizehnlinden" (Dek tri filioj) de F. W. Weber. Trad. Felix Dyba.  
ODO PRI SENMORTECO, de William Wordsworth. Trad. Louise Briggs.  
FRAGMENTOJ DE LA POEMO MIO CID. Trad. Amalia Núñez.